


UEN



—Ĉu «L'Immonde Esperantiste» ankaŭ atakis sinjoron S. Enpoŝul?
—Ne; oni ja scias, ke li ne havas monon.

NE ABONU ANKAŬ



PAPITU'n

Kataluna satira karikaturo gazeto.
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jarkvarono. 2 Ptoj.

Fremdlando: 3 >

PELAYO, 35 - BARCELONO

Neniu malbona esperantisto legas la

"FRANCA ESPERANTISTO," n,

KIUN ONI ABONAS EN

46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS

JEN

akceptas

Poŝtmarkojn

de ĉiu nacio por la pago de l'abono



—Ĉu vi amuziĝas, karulino?
—Ne; mi ne ankoraŭ renkontis agrablan personon por paroli

La lorno de Sinjoro Ribé

Sinjoro Ribé, —kiu ne konas la simpatian estron de la urbaj gvardianoj de Barcelono?—; sinjoro Ribé, ni ripetas, havas lornon.

Kaj sinjoro Clarence Bicknell, —ĉu iu forĝesis la simpatian poeton, kiu, li sola, organizis ĉe la Floraj Ludoj la truston de la premioj?—; sinjoro Clarence Bicknell havas lornon ankaŭ.

Kiam oni scias, ke sinjoro Ribé, krom estro de la urbaj gvardianoj, estas sekretario de la Societo de



—Niaj socialistoj ĉiam sendanke protestas! Kiam la ŝtato decidas zorgi pri ili kaj proponi al ili hejmon, ili trovas ankoraŭ argumentojn por plendoj!



—Miaj kolegoj tenis lin, kaj mi dispecigis lian kapon per pafado.

—Tio ja estis krimo!

—Kial! Ĉu mi ne lasis al li la rajton sin defendi parole?

«Atraccio de Forasters», kaj kiam oni scias, ke sinjoro Ribé havis lornon jam antaŭ la Kongreso, oni komprenos facile, kial tiu societo donacis lornon, kiel premion, al la plej bona verko pri la Maro. Sed ĉar oni povas supozi, ke la lorno de sinjoro Ribé fariĝis premio, kaj ke post la Kongreso li ne plu lornon havis, kaj ke la lorno de sinjoro Clarence Bicknell estas lorno, kiu apartenis al la simpatia sindonema estro de niaj samideaj palinuroj, ni bonvole klarigas hodiaŭ per tiu ĉi babilado, ke ambaŭ lornoj estas malsamaj, kaj ke, ho vè! el la komparo inter ambaŭ vidigiloj, rezultas, ke la plej admirinda ne estas la apartenanta al nia poeto...

Sinjoro Bicknell certe pardonos nin. Ni scias, ke li estimas la lornon de li gajnitan, kiel memoraĵon, ne nur de la Societo de «Atraccio de Forasters» sed ankaŭ de la Floraj Ludoj, de la «Revujo», de la Loka Komitato. Ni scias, ke kiam li rerigardas la premion, li ne vidas la materialan objekton, sed rememoras pri la glora momento, kiam oni donis ĝin al li. Ni ankaŭ kiel esperan-

tistoj rigardas kaj sentas tiel; sed krom esperantistoj, ni estas ĵurnalistoj, kaj sekve—scivolemaj kaj atentemaj al la valoro, ne mona, sed fizika. La publiko—eĉ la publiko de la seriozaj gazetoj, kiel JEN,—postulas sciigojn pri progresoj. Ni, ĵurnalistoj, estas sklavoj de la publiko. Ni devas hodiaŭ konfesi, ke la lorno de sinjoro Ribé estas la plej mirinda el la tuta mondo.

Ni sciis pri tio, ĉe la festo de la Floraj Ludoj. Rapidante por foriri, ni ektuŝegis sinjoron Cart, kiu kunportis kusenon kun belega fera branĉo, kaj flankiĝinte, ni falis inter sinjoron Bicknell kaj sinjoron Ribé. Ĉar ankoraŭ bruis en niaj oreloj la aplaŭdoj dediĉitaj al la gajninto de la premio pri Fido, ni profitis la momenton por gratuli lin. Tiam ni konatiĝis kun la mirindaĵo de de nia samlandano sinjoro Ribé. Tiu ĉi gratu ladis lin. —Brave, brave;—li diradis—ĉu vi gajnis la lornon de la Societo, kies sekretario, mi estas? Brave, mi gratulas vin.

Kaj iom fiere li aldonis:


—Jes; bona lorno; sed mi havas alian pli bonan! Per



—Fraulino, ĉu vi permesas, ke mi vin akompanu?

—Ne!

—Eble, vi akceptos akompani min?



—Tiu granda rado funkciigas la maŝinon, kiel poŝhorloĝo.

—Mi ja volus vidi, kiel poŝhorloĝo funkcias kun ĝi!



—Mi devis pagi la gason, kaj la oleo konsumiĝis ĉe mi; vi devas doni al mi monon.

—Kial! Ankoraŭ? Ĉu mi, antaŭ unu monato, ne donis al vi 10 spesmilojn?



PREMANTA LOGIKO

—Ĉio ĉi estas puno, kiun Dio faligas sur nin, ĉar ni diable ŝatas la progresadon! Tial Dio tuj distrancigas la telegrafajn fadenojn kaj la fervojojn.



—«L'Immonde Esperantiste» fariĝis tiel insultema kaj maldelikata, ke nun, nur la blinduloj povos ĝin rigardi sen naŭzoj.
—Jes; la blinduloj..... de sinjoro Cart.

la via vi povos vidi bonege kaj klare aferojn malproksimajn je 4 mejloj. Sed la mia atingas pli grandan malproksimecon: 100 mejlojn, 200 mejlojn, milionon da mejloj!

Ni restis mirigitaj. Sinjoro Ribé ridetis. Li daŭris.

—Ni bezonis ĝin kaj mi ĝin aĉetis. Imagu, ke mi devas atenti la karavanojn el fremduloj, kiuj vizitas nian urbon, jam multe pli antaŭ ol kiam ili transpasas la Pirineojn. Mi zorgas pri la alveno kaj eĉ pri la preparo de la karavanoj. Mia lorno helpas bonege min, kaj ne forlasante mian urbon mi povas sekvi la vojaĝantojn per la rigardo... Jen, ekzemple, mi sekvis la Doktoron dum lia tuta vojaĝo de Varsovio al Barcelono; mi sekvis, per la rigardo, vin, de Bordighera al la Franca Stacido-mo...

—Diable!—mi ekkriis—la lensoj de via lorno eble estas bonegaj, sed

kiamaniere vi poras vidi, ne Varsovion mem, sed eĉ plej proksimajn landojn? Mi komprenus, se ĉiu lando estus ebena; sed la surfaco de la tero estas ondolinia! Estas multe da montoj kaj valoj kaj pintoj kaj abismo inter ie ajn kaj Barcelono!

—Ha, certe sinjoro!—respondis sinjoro Ribé—certe la surfaco de la tero ne estas ebena, sed mia lorno ankaŭ ne estas rekta; ĝi estas ondolinia... tiel... ~~~~~.

Kaj li desegnis per la mano en la aero la ondolinian formon de sia mirinda instrumento.



—Ni pie preĝu por ke oni mortpafu ankoraŭ dekduon da herezuloj.



—Jes, mia karulo, mi amos vin. Hieraŭ mi vidis tre elegantan ĉapelon.



HISPANA MASTRINO: Mademoiselle, tio ja estas trouzi! Preni banon ĉintage!! Miaj flinoj estas miaj flinoj, kaj al ili sufiĉas unu bano ĉiumonate?

C. 100.



I. R. I. S.

MONDUMECO

- Oni multe parolas nun pri pragmatismo. Kio estas ĝi?
 —Kiel mi povos klarigi?... ĝi estas nova filozofia ideo ĵus elpensita, kaj...
 —Jes, mi komprenas: la filozofio sen fadenoj.

Lata
909



—Do, vi ne volas doni al mi Brazilian kafon?
—Ne; mi preferas, ke vi dormu.




SENKURAGIGITA IDISTO

—Antaŭ du jaroj, la reformemuloj estis inteligentaj personoj. Nun, kia naŭzo!, eĉ la malsprituloj estas partianoj de reformoj!



LA VOJAGO DE L' CARO

—Kia bedaŭro, ke vi ne vojaĝis ĝis Barcelono.... Vi tie loĝus, kiel ĉe vil



LA FIRMO

HACHETTE KAJ K_{IO}

79, Boulevard Saint - Germain

Paris

APERIGOS BALDAŬ

VORTARON

Esperanto Esperantan

DE KABE

NE AĈETU ĜIN ANTAŬ OL ĜI ESTOS APERINTA

NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro 3 Fr. (1,200 sm.)
Jarduono 2 » (0,800 sm.)

 **JEN** 

Eldonisto: RAMON FARRÉ, str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEKBANKO ESPERANTISTA» Merton Abbey, LONDON SW.)

REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Verlag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Libroeldonejo «Esperanto» — Valovaia, kv. 5.—MOSKVA.



FABRIKANTO DE KOLBASOJ

—Jes; estas vero. Miaj laboristoj laboras en malbonaj kondiĉoj. Ili finiĝas vomante sangon... Eble mi povus ĝin profiti...!